

## & Al knabino nur balbutanta Esperanton:

< Rekante 18 el 37 batoj por strofo, entute 222 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay. Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<1,6:37> (/mi mimi remi doTi La;La LaLa dodo dore mimi; mi mimi remi doTi La;La SoSo SoSo doTi La La,

(#Rekantaĵe: So So LaLa dore mi mi; Ti Tido reTi doLa So; So So LaLa dore mi mi i;)

)×6 )+

### (&Strofoj:

'1 Knabino, eta blondulin', ; Viaj okuloj mute plendas: ; Ne servas via lango vin ; Tre bone kaj vin ne defendas.

(×: **Florojn lulas vento varma ; Kreskas la tigoj el la ter' ; Florojn lulas vento varma.**)

'2 Se vin atakas malicul' ; Per pika ŝerc', petola ruzo: ; Vi nur balbutas, en okul' ; Aperas time la konfuzo. ....

'3 Sed tiam, kiel per kiras' ; La kavalir' sin brile armas, ; Jen, super via

embaras' ; Ridet' aperas, venke ĉarmas.

.....

'4 Kaj ekfulmetas mil kaj mil ; Radioj, kiel la fajreroj. ; Virkoro! Gardu pri l' trankvil', ; Atentu pri la bruldanĝeroj!

.....

'5 Ho, vi, muteta blondulin', ; Kun brila rid' sur roza vango, ; Ja tio ne ĉagrenu vin, ; Ke ne obeas via lango. ....

'6 Ne hontu pro balbuta vort', ; Havu kuraĝon kaj memfidon. ; Ja donis al vi bona sort' ; Armilon brilan: vian ridon. ....)